

Johann Wolfgang von Goethe, Heidenröslein	Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li <i>tradukita de Joachim Gießner</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Rozeto en herbejo <i>tradukita de Gotthilf Sellin</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo <i>tradukita de Konrad Matheus</i>
Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heiden, War so jung und morgenschön, Lief er schnell, es nah zu sehn, Sah's mit vielen Freuden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiru kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiru ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.
Knabe sprach: „Ich breche dich, Röslein auf der Heiden!“ Röslein sprach: „Ich steche dich, Dass du ewig denkst an mich, Und ich will's nicht leiden.“ Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Diris knab': „Mi rompos vin, vi rozeta floro.“ Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Diris knab': mi rompos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Diris knab': „Mi rompos vin, rozo sur erikejo.“ Diris roz': „Dorn' pikos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.
Und der wilde Knabe brach 's Röslein auf der Heiden; Röslein wehrte sich und stach, Half ihm doch kein Weh und Ach, Musst es eben leiden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Knab' sovaĝa rompĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj suferu pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Knab' sovaĝa rompĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defendis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.	Kaj knab' sovaĝa rompĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.
...	...	...	...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>. Melodioj estas aŭdeblaŭ en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>. La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich\\_Werner\\_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (\*1844-05-18 - †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en [http://kantaro.ikso.net/rozeto\\_en\\_herbejo](http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo). Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf\\_Sellin](http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin).

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.